
ISSN 2072-5825

# Espero Katolika




✸ 2.8.1943

✝ 26.3.2019

Numero 1-3-2019

Januaro-Marto 2019

***Sur la kovrilo:*** La prezidanto de I.K.U.E. D-ro Giovanni Daminelli

## ENHAVO

LA 26-AN DE MARTO 2019 FORPASIS LA PREZIDANTO DE I.K.U.E. D-RO GIOVANNI DAMINELLI 3

LA PREZIDANTO DE IKUE KAJ UECI GIOVANNI DAMINELLI FORLASIS NIN 4

LA FUNEBRA RITO EN BERGAMO 5

HOMILIO DE PIERLUIGI SVALDI 5

ADIAŬO DE NORMA CESCOTTI COVELLI 7

ADIAŬO DE MARIJA BELOŠEVIĆ NOME DE I.K.U.E. 8

ADIAŬO DE GIANNI CONTI 9

LA ESPERANTISTOJ DE MILANO REMEMORAS JOHANON 10

"JEN MI" - SINPREZENTIĜO DE GIOVANNI DAMINELLI 10

INTERVJUO DE LA REDAKTORO DE VATIKANA RADIO CARLO SARANDREA KUN LA NOVA PREZIDANTO DE I.K.U.E. EKDE LA FEBRUARO 2012 GIOVANNI DAMINELLI 12

FUNEBRA ADIAŬO DE U.E.C.I. 14

LA KATEDRALO NOTRE-DAME DE PARIZO 15

**Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio**

**Elektronika poŝto:** <ikue@ikue.org>

**TTT-paĝoj:** http://www.ikue.org - http://www.esperokatolika.org * **Dissendolisto:** <ikue@yahoogroups.com>

**UEA-konto "ikue-v" * Banko:** "Unione internazionale cattolica esperantista" Roma, Italio

IBAN IT34H0760103200000023290000 - BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

*Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo* - Registrazione presso il Tribunale di Roma

n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

*Presejo* - Tipografia

ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

*Respondeca Direktoro* - Direttore responsabile

Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00010 GUIDONIA RM, Italio

tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

**Espero Katolika**, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de **I.K.U.E**.
**INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA** internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Spirita Konsilanto:** frato Pierluigi Svaldi - **Prezidanto:** Giovanni Daminelli - **Vic-Prezidantino:** Marija Belošević - **Vic-Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Ĝenerala Sekretario/Kasisto, direktoro de la C.O.:** Carlo Sarandrea - **Estrarano:** Pavol Petrík. **Kontorevizoroj:** Norma Cescotti Covelli,Tiziana Fossati, Krzysztof Tomczak.

# LA 26-AN DE MARTO 2019 FORPASIS LA PREZIDANTO DE I.K.U.E.
# D-RO GIOVANNI DAMINELLI



**La 16-a IKUE-prezidanto naskiĝis en Bergamo (Italio) la 2-an de aŭgusto 1943. Doktoro pri matematiko, esperantisto ekde 2000, en 2003 li akiris la superan diplomon de la Itala Instituto de Esperanto. La prezidanto de la itala sekcio de IKUE - UECI ekde 2003 – li redaktis ties organon "Katolika Sento", kreis kaj prizorgis la oficialan paĝaron de la itala IKUE-sekcio (www.ueci.it).**

**Li gvidis multajn E-kursojn en Milano ĉe la "Universitato de la tria aĝo" kaj en la urba E-klubo. Ekster IKUE li estis membro de la paŝtista konsilio de sia paroĥo, sekretario de la Itala Instituto de Esperanto kaj konsiliano de la E-klubo de Milano. Li forpasis la 26-an de marto 2019 en Milano pro kancero.**


**La funebra rito por la prezidanto de IKUE D-ro Giovanni Daminelli okazis ĵaŭdon la 28-an de marto 2019 je la 15-a horo en la preĝejo de sankta Siksto en Bergamo, Italio. La rekviemon celebris tri pastroj, inter ili la estrarano de IKUE sac. Pierluigi Svaldi. Ĉeestantaj estis ankaŭ esperantistoj el Milano kaj ĉirkaŭaĵo de Trento. Dum adiaŭo nome de IKUE esperantlingve parolis la unua vicprezidantino Marija Belošević.** ■

**Ripozon eternan donu al la frato Giovanni, Sinjoro, kaj la senfina lumo lumu al li, li ripozu en paco. Amen.**





# La prezidanto de IKUE kaj UECI Giovanni Daminelli forlasis nin



Nia amata prezidanto mortis sepdek kvinjaraĝa la 26-an de marto 2019 en sia loĝurbo Sesto S. Giovanni, Italio.

Terura fulma malsano forprenis lin nur kvin semajnojn post ĝia konstato.

Giovanni Daminelli naskiĝis en Bergamo la 2-an de aŭgusto 1943, kiel la unua el kvar gefratoj.

Li diplomiĝis kiel elektra inĝeniero ĉe la industria Instituto "P. Paleocapa" de Bergamo.

Kiel studento – laboristo li doktoriĝis en matematiko en la jaro 1982 ĉe la Ŝtata Universitato de Milano. Li laboris ĉe la Centro de Scienca Esplorado kaj kalkulo de la Industrioj Pirelli en Milano ricevante multajn premiojn pro siaj inventoj. En la jaro 2000 li komencis studi Esperanton.

Li aliĝis al KEC (Katolika Esperanta Centro) en Milano, al UECI (Itala Esperanta Katolika Unuiĝo), al IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista), al FEI (Itala Esperanta Federacio).

En la jaro 2003 li sukcesis en la triagrada ekzameno por instruado de Esperanto. Tuj li komencis instrui Esperanton ĉe la Universitato de la tria aĝo en Milano kaj ĉe la CEM (Milana Esperanta Klubo).

Prezidanto de UECI li estis ekde la jaro 2003, redaktante la revuon KATOLIKA SENTO ĝis sia morto kaj li kreis la retejon de la asocio www.ueci.it.

Li estis sekretario de IIE (Italaj Instruistoj Esperantistoj) kaj konsilanto de la Milana Esperanta Klubo.

Li organizis multajn Esperantajn kursojn ĉe la Universitato de la tria aĝo en Milano, ĉe la sidejo de CEM kaj ĉe la Liceo Manzoni. Li estis kuratoro de 150 kursanoj de la kurso KIREK.

Li partoprenis multajn universalajn E-kongresojn, IKUE kaj ekumenajn E-kongresojn, la E-aranĝojn de Bibliaj Tagoj kaj la aliajn, kiujn li mem organizis en Italio.

En la jaro 2012 li estis elektita prezidanto de IKUE, ofico, kiun li tenis ĝis la morto.

Dum multaj jaroj li organizis kune kun la amiko Gianni Conti la ĉeeston de grupo da esperantistoj en placo Sankta Petro en Romo dum la beno de la Papo "Urbi et Orbi" en Kristnasko kaj Pasko, tenante grandajn panelojn formantaj surskribon ESPERANTO.


Por la Esperanta Katolika Centro de Milano li organizis la sanktan meson en Esperanto la trian sabaton de ĉiu monato. En la retejo li disponigis koncernajn tekstojn de la Meslibro kaj Legaĵaro en Esperanto.

Por plibonigi la scion de la lingvo Esperanto, dum kelkaj jaroj ĉiun merkredon li organizis konversacian renkontiĝon, dum kiu la uzo de la itala lingvo estis malpermesita.

En la Esperanta Milana Klubo li faris sennombrajn prelegojn pri la lingvo, pri la Esperanta kulturo kaj pri aliaj kulturaj temoj.

Daminelli fakte interesiĝis pri multaj aferoj.

Li pasiiĝis por la klasika muziko kaj ludis kelkajn muzikajn instrumentojn. Li estis tre aktiva en sia paroĥejo de Sesto S. Giovanni kiel membro de la paroĥa konsilio. ■


**Parrocchia S. Sisto - Colognola Bergamo**

giovedì, 28 marzo 2019:

**Santa Messa di saluto al signor Giovanni Daminelli**

**Antifona d'Ingresso** Sal 138,23-24

Scrutami, o Dio, e conosci il mio cuore; vedi se percorro una via di menzogna, e guidami sulla via della vita.

## LA FUNEBRA RITO EN BERGAMO

La funebra rito okazis ĵaŭdon la 28-an de marto 2019 je la 15-a horo en la preĝejo de sankta Siksto en la kvartalo Colognola de Bergamo.

Ĉe la ĉerko estis la flago de Esperanto.

Multaj estis la ĉeestantaj esperantistoj ĉefe el la urbo Milano kaj norda Italio.

Kuncelebris la meson tri pastroj, inter ili la estrarano de IKUE frato Pierluigi Svaldi, kiu ankaŭ predikis.

Nome de IKUE esperantlingve legis mesaĝon la unua vicprezidantino Marija Belošević.

Je la fino de la ceremonio la paroĥestro, speciale alveninta el la urbo Sesto S. Giovanni, memoris lian dolĉan kaj rezervitan naturon.

Johano kapablis doni ĉiam konstruajn sugestojn. Li memorigis ankaŭ lian kapablon kunigi homojn de diversaj nacioj, ankaŭ danke al lia sperto akirita en la Esperanta mondo. Norma Cescotti Covelli kaj la amiko Gianni Conti atestis lian amikecon per kortuŝantaj rememoroj.

La mesaĝojn prezentis la vicprezidantino de IKUE Marija Beloŝeviĉ, la vicprezidantino de UECI Tiziana Fossati kaj la reprezentantino de la CEM de Milano.

Daminelli estis enterigita en la tombejo de Colognola de Bergamo, kie ankaŭ liaj gepatroj ripozas. ■

## HOMILIO

Vi tion sciis. Jes, vi tion sciis.

La tempo por vi fariĝis mallonga. Tro mallonga. Pro tio vi penadis, laboradis intense, eĉ nokte; vi estis ĉiam preta proponi vian helpon al ĉiu ajn estus ĝin petinta de vi .

Jes, vi tion sciis. Vi sciis, ke vi havis nombritajn tagojn. Ankaŭ ni tion sciis. Sed ni tion ne kredis.

Tiel, ke ni alportante variajn pretekstojn, donis al vi plenumeblan laboron, ni nin konfidis al via disponemo, ni vin delegis pri multaj aferoj, por ke ni ĝuu vian ĉeeston.

Jes, ĉar senkonscie ni komprenis, ke vi estos foririnta. Nun vi estas ĉi tie kun ni por celebri la sanktan eŭkaristion.



Vi mem fiksis al ni rendevuon kaj ni alvenis. Via delikata, eĉ plej silenta ĉeesto, nin konsternas preter ĉia ajn atendo, kiel homilio pri la vivo, pri nia pilgrimanta vivo ĉi-sube,



homilio pri la vivo nin atendanta tie supre, pri la vivo plena, senlima rezervata al tiuj, kiuj al ĝi sopiras.

Ankaŭ ni aŭdis tiujn kuraĝigajn vortojn, kiujn vi aŭdis tie, en la malsanuleja lito: "Venu al mi vi ĉiuj, kiuj estas laborantaj kaj ŝarĝitaj, kaj mi vin ripozigos. Metu sur vin mian jugon, kaj lernu ĉe mi, ĉar mi estas milda kaj korhumila, kaj vi trovos ripozon por viaj animoj."

Kaj tuj vi tion ekkredis, vi fermis la okulojn kaj vi vin konfidis al Dio.

Tre bele por refuzi, tre interesa post intensa kaj engaĝiĝinta vivo.

Nun vi, foririnta, ne ĉesos tie supre ripeti



tiujn kuraĝigajn vortojn, kiujn ankaŭ ni aŭdis ĉi-sube de ĉi tiu ambono ĵus antaŭ la momento :

"Mi Vin gloras, ho, Patro, Sinjoro de la ĉielo kaj la tero, ke tion Vi kaŝis for de saĝuloj kaj prudentuloj, kaj malkaŝis al infanoj."

Estas vere, ke ne estas facile kredi al la simplaĵoj, ke ne estas evidente, ke oni sukcesos esti etaj kaj humilaj antaŭ la vero de la vivo kaj de la historio. Ni jam ekkonsciis, ke ofte ni ludas la rolon de saĝuloj, ke ni ĉiam serĉadas esti konsiderataj kleruloj kaj spertuloj.



Sed vi, Johano, havanta la nomon "Dio faras gracon", havis la okulojn kutimiĝintajn rekoni en ĉiu el ni la gracon de Dio kaj ĝian belecon, esti dankema al Dio pro viaj renkontiĝoj kaj ekkonatiĝo kun ni.

La parolo de Dio memorigis al ni, ke "La savo de la justuloj venas de la Sinjoro". Tio multe nin konsolas.

Nun, kiam Johano ne plu estas inter ni, estas la Sinjoro tiu, kiu akceptas lian animon en la lumon kaj en la pacon. Ni al Li konfi-

das lin, estante certaj pro la mizerikordo de Dio.

Ni aŭdis ankaŭ ke: "La animoj de la justuloj estas en la manoj de Dio, neniu turmento tuŝos ilin". Ankaŭ tio multe nin konsolas: memorante Johanon esti en la manoj de Dio, ni ankaŭ sentas, ke li estas eĉ pli apude, pli fidela amiko, pli proksima nia kunvojaĝanto en tiu ĉi mondo, kie ni estas ankoraŭ pilgrimantoj.

Kaj la parolo de Jesuo en la Evangelio, kiun ni ĵus aŭskultis, invitas nin rigardi tion, kion vidas Dio: la rigardo de la Patro, kiu estas en la ĉielo, estas tiu vera kaj sankta, tre malsama ol tiu, kiun ni vidas, la ununura rigardo, kiu sentigas, ke ni estas liaj filoj kaj ke Li savas ĉiam nin, precipe dum la lasta tago. ■

***Frato Pierluigi Svaldi***






***Esperantistoj recitas la preĝon "Patro nia" ĉe la tombro de Giovanni Damineli en la tombejo de Colognola en Bergamo***

## Adiaŭo de Norma Cescotti Covelli

Kara Johano, mi havas ankoraŭ antaŭ la okuloj la lastan mesaĝon, kiun vi sendis al mi respondante al la mia. Mi demandis al vi la kialon de via eniro en malsanulejon, kaj per granda simpleco vi respondis tiel: " Ne maltrankviliĝu! Mi havas nenion. Post kelkaj tagoj mi revenos hejmen kaj tiam mi laborigos vin pli multe ol antaŭe, ĉar estas tiom multe da plenumeblaj aferoj. Vi estis tiel trankviliga, ke mi kredis al vi.

Male, anstataŭ reveni, vi ekiris tuj por longa senrevena vojaĝo. Ni ĉiuj estas konsternitaj kaj nekredantaj, ke tio jam okazis. Ene, en niaj animoj kaj ĉirkaŭ ni estas granda malpleneco. Vi estis nia gvidisto, nia instruisto.

Ĉiu via entrepreno, ĉiu via projekto estis altvaloraj kaj ni sekvis vin, cedemaj, kun la certeco, ke vi estos plenuminta ĉion.

Estis bele kunlabori kun vi: neniam kri-

tiko, aŭ riproĉo, aŭ eĉ la plej eta observo.

Vi ŝatis nian kunlaboradon, kvankam ne ĉio estis de vi favore akceptita.

Vi estis ĉiam preta aŭskulti nin, vi laboradis tage kaj nokte, tie kaj ĉi tie, neniam montrinte signojn de laciĝo. Nun, kion ni faros sen vi?

Konsolas nin la espero, ke vi de supre nin ankoraŭ sekvos, kaj niaflanke ni promesas al vi daŭrigi vian agadon, sekvi zorge viajn konsilojn, senti, ke vi ĉiam ĉeestas dum la malfacilaĵoj. Dankon, kara Johano, pro ĉio de vi al ni farita kaj donita. Ni estos ĉiam kun vi, kun la konscio, ke vi neniam forgesos nin. Saluton! ■



***Bibliaj Tagoj en Mainz 2018, Germanio: F. Sorosina, F. Trussardo, N. Cescotti Covelli kaj Giovanni Daminelli***

## Adiaŭo de Marija Belošević nome de I.K.U.E.

Estimataj, karaj familianoj de la karmemora Giovanni Daminelli kaj ĉiuj vi, ĉi tie kolektitaj ĉe la adiaŭa momento. Akceptu sinceran kondolencon nome de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, kies Giovanni ekde 2003 estis la kontoreviziisto kaj ekde la jaro 2012 prezidanto. Li estis la 16-a prezidanto dum ĝia pli ol centjara historio. Li estris UECI kaj redaktis revuon Katolika Sento, kreis kaj prizorgis la oficialan paĝaron de la itala IKUE-sekcio (www.ueci.it). Ankaŭ li gvidis E-kursojn en Milano ĉe la "Universitato de la tria aĝo" kaj en la urba E-klubo.



***Giovanni Damineli kaj Marija Belošević en la 66-a IKUE-kongreso 2013 en la pola pilgrimloko Kalwaria Zebrzydowska***

Krom naciskale, en la internacia nivelo li organizis la kongreson en Trento-Cadine.

Temis pri la ekumena kongreso, kaj ĝuste por ekumenismo li havis apartan senton. Li partoprenis plurajn ekumenajn kongresojn. Regule li partoprenadis la Bibliajn Tagojn, al kiuj li ĉiam volonte alkondukis kelkajn pliajn personojn. Ekde la jaro 2012 IKUE regule organizas esperantigon de la tekstaro por la Preĝsemajno por Unuigo de Kristanoj, al kiu traduke kontribuas deko da esperantistoj de la tuta mondo. Giovanni regule tradukis la enkondukan parton, en kiu estis klarigita la devizo de la semajno. Ekster IKUE li estis membro de la paroĥa konsilantaro, sekretario de la Itala Instituto de Esperanto kaj konsiliano de la E-klubo de Milano.

Je ĉi tiu momento la katolikaj esperan-



***En la 69-a kongreso de IKUE 2016 en la urbo Nitra, Slovakio***

tistoj dise de la mondo preĝe estas unuigitaj kun ni. La pastroj – esperantistoj estis invititaj celebri la mesojn, ĉu hodiaŭ, ĉu ene de oktago.

Hodiaŭ la meson celebris la ĉefepiskopo de Alba Julia en Rumanio Mons. Georgo Jakubinyi kaj Mons. Gabriel Anda en Kamerunio. La 2-an de aprilo en Žirovnice, Ĉehio, la meson celebros sac. Max Kašparů.

Kara Giovanni, **Danko**, estas la sola vorto kiun ni, la katolikaj esperantistoj povas diri apud via ĉerko. La Mizerikorda Patro akceptu vin en sian Regnon.

Dankon pro ĉi bela vort', dankon pro ĉiu kunpreĝ', dankon pro ĉio!

Daŭrigu sekvi vian kaj nian IKUE-n el la ĉielo, kie ni iam ĉiuj denove renkontiĝos! ■

***Marija Belošević, la vicprezidantino de IKUE***



***En la Ĝardeno Esperanto de Conti***

## Adiaŭo de Gianni Conti

Mia kara amiko Johano, mi scias, ke vi aŭskultas min. Mi dankas vin, ĉar vi estis ĉiam ĉe mia flanko, kiam ni iris, dum sinsekvaj dektri jaroj, ĉe Kristnasko kaj Pasko, kun niaj paneloj en Romo en la placo Sankta Petro, por danki la Papon, kiu legis siajn bondezirojn en Esperanto.

Mi dankas vin plue pro la grandega laboro, kiun vi faris, ĉu kiel prezidanto de du Esperantaj asocioj, ĉu kiel tre bona instruisto.

Mi ne scias, kiel ni povos daŭrigi kun sukceso la laboron, kiun vi restigis al ni; tio estos ege malfacila, kaj mi timas, preskaŭ neeble por ni!

Sed la plej bela afero, kiun vi lasis al ni estis via boneco kaj via granda kristana fido, malfacile kompareblaj de ni ĉiuj, viaj geamikoj.

Dankon, Johano, kaj mi petas vin: tenu por mi lokon ĉe vi, ĉar post mallonga tempo mi venos trovi vin. ■

***Via granda amiko Gianni***




***G. Daminelli kun G. Conti en la Ĝardeno Esperanto de geedzoj Conti en Milano-Cormano***

## La esperantistoj de Milano rememoras Johanon

Homoj kiel Johano ne ofte naskiĝas kaj lia forpaso estas por ni samideanoj ne nur home doloriga, sed ankaŭ neplenigebla. Johano estis por ni donaco, anĝelo, kiu moviĝis sur la piedpintoj ene de la movado donante al ni ĉiuj multon, eĉ nin trodorlotante, sen peti de ni ion: donaci estis por li rekompenco.



*En la Esperanto-Centro de Milano*

La kursoj pri Esperanto zorgataj de li, la kunvenoj de li organizitaj en nekritikebla maniero, la ĉiam interesegaj prelegoj, kiuj temis pri diversaj aferoj: de Esperanto ĝis matematiko, biografioj, anekdotoj ktp., vere multe mankos al ni ĉiuj.

Eĉ se lia ĉeesto mankos, li lasis al ni sian heredaĵon: la validaj junuloj, kiu laŭ liaj ideoj kunlaboras por daŭrigi la disvastigadon de la internacia lingvo kaj tiamaniere la pacan mesaĝon de Zamenhof.

La Kredo, kiu lin akompanis dum sia vivo, donas al ni la konsolon, ke malgraŭ la doloriga malsano li akceptis serene la finon de sia surtera ekzistado. Dankon Johano! ■



*Prelego de Giovanni Daminelli en la Milana E-klubo 2018*

## JEN MI sinprezentiĝo de Giovanni Daminelli

Jen mi. Mi estas la nova prezidanto de UECI. Konscia pri miaj limoj, mi akceptis ĉi tiun taskon per iom da senprudenteco, sed iu devis ja prizorgi ĝin kaj pro la insisto de tiom da amikoj mi estas konvinkigita. Miaj limoj, kiuj markas la diferencon al mia antaŭulo, estas baze ĉi tiuj du:



*Dum Kongreso de U.E.C.I en Rimini 2003*

1) Mi estas esperantisto aliĝinta al UECI ekde la jaro 2000, el tio sekvas, ke mi konas iom pri historio, ekde nelonge ankaŭ pri nia movado, malmulte mi konas pri personoj, kiuj en ĝi partoprenas, kaj ankoraŭ mi ne atingis la lingvan lertecon de tiu, kiu praktikas Esperanton de multaj jaroj.

2) Mi ne havas sperton pri administra aŭ publika rilatoj; ĝis nun mi interesiĝis eks-




*Bibliaj Tagoj en Trento 2012. Estraro de IKUE: Giovanni Daminelli, Stefan Lepping, Marija Belošević, sac. Pierluigi Svaldi, Carlo Sarandrea kaj Miloslav Šváček*

kluzive pri inĝenieraj kaj kalkulaj problemoj, do mi esperas, ke vi pardonos kelkajn miajn nevolajn rilatajn mankojn kaj, se estos necese, fratece bonvolu min korekti.



***En la 20-a Ekumena E-Kongreso 2014 en Trento-Cadine dum ĉeesto de la episkopo de Trento Mons. Luigi Bressan***

Mi estas nura amatoro, sed kun la helpo de la bona Sinjoro mi provos superi miajn limojn por povi Lin servi profesie. Nia pastro Duilio iam deklaris, ke Esperanto estas verko de la Sankta Spirito, kiu laboras uzante homojn, kaj Esperanto estas la kampo, al kiu Li vokas nin labori. Tial mi komencis min prezenti per "Jen mi"; ĝi estas la vorto, per kiu oni ofte respondas al la alvoko de la Sinjoro en la Sankta Skribo. Mi certe ne kuraĝas min kompari kun ĉi tio, kun Abraham, Samuel, Jesaja aŭ tiom da aliaj, sed mi konscias, ke en la kampo de la Sinjoro ĉiu rolo estas grava kaj ke Li provizos miajn mankojn.



***20-a EEK 2014 - vizito de sinagogo en Merano***

Ni ĉiuj estas implikitaj kaj ni ĉiuj povas kunlabori, eĉ tiuj, kiuj ne havas specifajn taskojn; iafoje ankaŭ sufiĉas nur raporti pri io bona aŭ malbona, sin disponigi, ne krei nenecesajn malfacilaĵojn, fari sugestojn, kun spirito de servo en la senco, ke se oni sugestas ion, estas bone, se li/ŝi tiam donas sian disponeblon kaj se lia/ŝia ideo ne estas akceptita, li/ŝi ne devas ĉesi kunlaboron. Ni ĉiuj laboras por la sama Majstro, kiu ankaŭ restarigas tiujn valorojn, kiujn homoj ne agnoskas.

Ĉe tiu ĉi punkto oni atendas scii, kion ni intencas fari, do mi prezentas programon. Mi indikos nur la ĝeneralajn liniojn, kaj pri la detaloj devos decidi kaj ilin aprobi la Centra Komitato.



***69-a IKUE-Kongreso en Nitra, Slovakio, 2016***

Ĉio estas jam spurita en la unua artikolo de nia statuto, kie la celoj de nia asocio estas:

a) La formado de niaj membroj: pro tio ni organizas sanktajn mesojn en Esperanto, la lokajn kunvenojn, la naciajn kongresojn de UECI kaj la partoprenon en la internaciaj kongresoj de IKUE.

Ĉi-rilate la revuo Katolika Sento devas esti ilo ne nur formanta, sed ankaŭ informanta por faciligi la partoprenon de la interesatoj en diversaj iniciatoj.

b) La atesto de la Evangelio, estu ne nur reciproka atesto inter ni, sed ĉefe ankaŭ eks-

ter ni, ambaŭflanke. Kun niaj samlandanoj ni aktive kunlaboru kun iu laika esperantista organizo kaj en niaj reciprokaj rilatoj en internacia kampo ni ne forgesu pri la bonfaradoj. En ĉiu situacio ĉiu el ni atestu esti disponebla kaj kongrua persono kun propraj kristanaj principoj.



***64-a IKUE-Kongreso 2011, Zagrebo, Kroatio***

c) La ekumena dialogo: ĝi esprimiĝu kaj en interhomaj rilatoj, kaj per partopreno en la ekumenaj kongresoj, precipe en la komuna preĝado, en la reciproka ekkono kaj en la praktikado de la karitato; tio devas esti kultura fakto: ni devas plifortigi niajn konvinkojn por ekscii, kiom da bono ekzistas ĉe la aliaj, sen rezigni pri nia identeco.

d) Uzo de Esperanto: ĝi estas la instrumento de nia laboro; ni devas profundigi nian scion de ĝi, ĉiam zorgi por esti pretaj uzi ĝin,



***Kun italaj kongresanoj en la 22-a Ekumena E-Kongreso 2018 en la urbo Poděbrady, Ĉeĥio***

kiam tio estas bezonata. Tiuj, kiuj kapablas, devontigu sin al ĝia instruado kaj al disvastigo de ĝia uzado. Ni devas antaŭenigi ĝian disvastigon precipe inter la junuloj; mi tre emas ĝian propagandon kaj subtenon ne nur loke, sed ankaŭ internacie.

Mi promesas baldaŭ renkonti ĉiujn por ekkoni homojn kaj problemojn. Ni ĉiuj helpu unu la alian per preĝo, kun aparta penso pri via prezidanto, kiu, kiel mi sentas, tion bezonos. Dio benu nin kaj nian bonan laboron! ■

## Intervjuo de la redaktoro de Vatikana Radio Carlo Sarandrea kun la nova prezidanto de I.K.U.E. ekde la februaro 2012 Giovanni Daminelli

CS. Ekde pasinta februaro Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista havas novan prezidanton. Temas pri la 16-a prezidanto ekde la starigo de la Unuiĝo en la jaro 1910. Li estas la itala doktoro Giovanni Daminelli.

CS. Kaj Esperanto? Kiam kaj kiamaniere Vi ekkonis ĝin? En la senco: matematiko kaj kalkuladoj jes iel estas kompareblaj al Esperanto, lige kun prefiksoj kaj sufiksoj, kvazaŭ matematika formulo, sed se dum mi diras tion, mi jam aŭdas riproĉojn de esperantistoj, ĉar mi diras la saman tezon, kiun de tempo al tempo, ekde pioniraj jaroj, oni levis kontraŭ Esperanto por diri, ke ĝi ne estas vivanta, homa lingvo.

GD. Efektive jes. Mi doktoriĝis per tezo pri matematika logiko, kaj profesie devis lerni kelkajn komputilajn lingvaĵojn, pro tio mi emis interesiĝi pri lingvistiko. Komence mi imagis, ke Esperanto, artefarita lingvo, estas ia speco de komputila kodo, kiu, pro tio, ne povas esprimi ĉiujn nuancojn de la homaj lingvaĵoj. Kiam oni sciigis al mi, ke la Katolika Esperanto-Centro de Milano starigis kurson pri ĉi tiu lingvo, fare de nia



***Trento, Italio, 2012: Kun nova prezidanto de IKUE frato Giovanni Daminelli***

neforgesebla Glauco Corrado, mi tuj aliĝis nur pro scivolemo. Baldaŭ mi ekkomprenis, ke Esperanto ne estas kodo, sed vera lingvo, per kiu oni povas esprimi ĉian ideon, mesaĝon, senton. Ĝi estas vere genia planlingvo.

CS. Kiamaniere Vi fariĝis esperantisto?

GD. Konvena demando, ĉar ne ĉiuj, kiuj lernis Esperanton, estas esperantistoj. Mi esperantistiĝis en la jaro 2000, kiam mi eltenis la unuagradan ekzamenon. En tiu jaro en Rimini okazis la 53-a IKUE-kongreso. Ankaŭ en ĉi tiu okazo, mi aliĝis nur pro scivolemo: mi volis testi mian konon de la lingvo post sesmonata kurso. Mi miregis konstatante, ke mi komprenas preskaŭ ĉion kaj eĉ kapablis iomete paroli. Pro mia profesio, ĉiutage mi devis uzi la anglan, kaj ĉiujare mi vizitis kurson pri la angla lingvo, malgraŭ tio, mi devis konstati, ke mia kompreno de la Esperanta elparolo estas pli alta ol tiu de la angla. Tio entuziasmigis min kaj faris min esperantisto.

CS. Vi diris, ke Vi aktivas ĉefe en la itala E-movado. Kiel Vi fartas – por tiel diri – en internacia medio, kun grava tasko?

GD. Sincere mi konfesas, ke multaj aspektoj de la vivo de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista estas por ni nekonataj. Kial do mi akceptis kandidatiĝi por ĉi tiu tasko? La insisto de kelkaj samideanoj, kiuj firme kaj afable petis tion, konvinkis min. Eble mi ne estas la plej taŭga persono – pri tio mi konscias – sed devas esti ja iu, kiu surprenas ĉi tiun ŝarĝon. Tamen, mi konfidas en la dia helpo, ĉar ni scias, ke Li por realigi siajn projektojn elektas plej ofte la ŝajne malplej dignajn, por ke ili estu simpla ilo en Liaj manoj.




***Plurfoje sur la Placo Sankta Petro en Vatikano dum mesaĝoj de la papo Urbi et Orbi (al urbo kaj mondo)***

CS. Cent du jara historio estas malantaŭ Vi. Ne eblas resumi la tutan historion ĉi tie, sed almenaŭ ni diru, kiamaniere Vi imagas la estontecon de IKUE. Kiu estas Via laborplano, se mi povas tiel paroli.

GD. Mi plene konscias, ke mi ricevis taskon, kiu daŭrigas jardekojn da sinoferema, malavara kaj ofte nekonata agado de miloj da homoj. Al la antaŭaj prezidantoj, miaj antaŭuloj mi adresas mian profundan dankemon kaj admiron. Jes la agado por fari estas multa. La celoj kaj la vojo estas priskribitaj de nia statuto: pere de la lingvo Esperanto, realigi religian, eklezian kaj laikan sperton, montri la unuecon de la Eklezio, uzante la internacian lingvon en ĝia liturgio kaj apostola agado; kontribui al realigo de la homaj interkompreno, frateco kaj paco en la nuntempa mondo; agadi por la ekumena movado.

CS. La planita agado estas vere multa, ĉu oni povas realigi ĉion?

GD. Nia movado travivas situacion saman al la multegaj movadoj tra la mondo bazitaj sur volontulado. La aferoj por fari superabunde superas la kunlaborantojn je dispono. Mi petas de ĉiuj preĝojn, por ke Dio sendu laborantojn en sian vitejon. Mi konfidas, ke la Providenco – kiu cetere neniam mankis en nia rondo – daŭre subtenu nin.

CS. Ni kore dankas pro Via komplezemo akcepti kelkajn demandojn de ni.

GD. Estas mi, kiu dankas Vin pro Via gastigemo. ■

***Carlo Sarandrea***

http://radio-vatikana-esperanto.org/elsendo.php?d=2019-04-25

## Funebra adiaŭo de U.E.C.I

Ankaŭ la komunumo de UECI, Itala Katolika Unuiĝo Esperantista, kies prezidanto Giovanni estis, preĝas por nia frato Giovanni: ĉi tie, en la loko de la funebra rito, kaj dum ĝi, kaj ĉie, per la kunuleco en Kristo, kiu ebligas al ni havi realan spiritan proksimecon.

La disiĝo kun li, tiom abrupta, kaj ankaŭ la maniero per kiu la malsano forprenis lin de ni, kaŭzis en ĉiuj grandan doloron, kiun nur la kredo povas konsoli.

Kune kun la konsolo de la kredo, donas al ni pacon kaj estigas dankemon la donaco povinte koni lin kaj la atesto, kiun li postlasas al ni: tiu de vivo travivita en la obeemo al la Spirito de la Sinjoro, vivo de homo kun granda koro, saĝa, humila, atentema al la proksimuloj multe pli ol al si mem.

Ĉi tiuj karakterizoj, kune kun lia milda karaktero, ĉiam igis, ke ankaŭ en la E-movado ĉiuj, kiuj alproksimiĝis al li, ne nur ŝatis lin, sed fariĝis liaj amikoj. La multegaj kondolencaj mesaĝoj alvenantaj, ankaŭ el aliaj



landoj, al la asocio aŭ aperintaj en interreto, substrekas tion.

Oni diris al ni, ke la esperantistoj estis por li kvazaŭ familio kaj tio ĉi kortuŝis nin, ĉar tiu belega esprimo, "esti familio", estas ĝuste la sento, kiu ligis nin. Ni sentas tion aparte hodiaŭ, dum ni kunpartigas la preĝadon kaj la amemon de la animo.

Al liaj familianoj iru niaj plej sentataj kaj amemaj kondolencoj.

Al la Sinjoro leviĝas dankemo pro la donaco, kiun Li faris al ni per Giovanni.

**Kaj dankon al vi, Giovanni!**

*Tekstoj krom la paĝo 3 estas transprenitaj el la revuo de UECI Katolika Sento 2/2019. Fotojn disponigis Marija Belošević, Miloslav Šváček kaj UECI.*

# LA KATEDRALO NOTRE-DAME DE PARIZO

Surloke de la pagana templo de la «Parisii» (ties submuroj estas ankoraŭ videblaj) ekstaris unue kristana baziliko, kaj poste merovida katedralo en romanika stilo, riparita kaj riĉigita (857). Ekde la jaro1123 staras la plej fama katedralo en la mondo, ĉar jam pli ol mil jarojn ĉi tie ŝvebas preĝoj.

Vintre kiel somere, ĉiutage, fideluloj aŭ turistoj el la tuta mondo, amasiĝas ĉe la katedralaj pordegoj; plej ofte, ilia unua pariza vizito estas por la »Katedralo«. Ĉar ĝi estas la prestiĝa dekoracio, kie okazis la disvolvado de la plej gravaj horoj de la historio de Parizo kaj ankaŭ de Franclando, ĝi estas unu el la plej puraj mirindaĵoj el la ogiva stilo de la mezepoka arkitekturo.

Pli mallarĝa ol nun, la antaŭpreĝeja placo estis superita per la tre malnova statuo de »Grand Jeuneur« (La Granda Fastanto – la sankta Johano Baptisto). Kiel diferenca estis la placo antaŭ apenaŭ 100 jaroj. La altigo de



***Kelkaj partoprenintoj de la 63-a IKUE-kongreso 2010 antaŭ la katedralo Notre-Dame***

la tereno je 6 metroj senigis la Katedralon je ĝiaj ŝtupegoj.

Nun meze de la placo, sigelita platpavimero el bronzo markas la kilometran deirpunkton de ĉiuj naciaj vojegoj!

De ĉi tie, laŭ ĝia fasado, la ĉef-preĝejo aperas majeste belega. Sed iru en la mezon de la ĝardeneto (R. Viviani) apud la malnova preĝejo »Saint Julien-le-Pauvre«, ĉe la maldekstra bordo de la riverego. Tie la vidkampo al Notre-Dame estas pli impresa. En la centro de tiu admirinda pejzaĝo la Katedralo de Parizo superstaras glorkronite. Jen la plej bela religia monumento de la ĉefurbo, pinto de la franca arto.

Certe estas katedraloj pli vastaj ol tiu ĉi, aliaj, pli ornamitaj, sed la ekvilibro de tiuj ĉi proporcioj, la pureco de tiuj linioj, la sobreco en la riĉa dekoracio mem estas rimarkindaj.

Ĉu estas facile imagi la blankaĵon de Notre-Dame, speguliĝante en la Sejno, antaŭ 800 jaroj? Tute blanka, ja, ĉar nur la statuoj de la pordegoj estis kolorigitaj kaj elmontriĝis sur ora fono. Tiu vidaĵo elvokas aliajn bildojn: la militajn paradojn, la movbriladon de la kaskoj, armaĵoj, lancoj, la religiajn procesiojn, la lukson de la oraj, arĝentaj teksaĵoj, la brilan sulkon de la relikvujoj, dum sonoradis la »Bourdon« okaze de la plej gravaj imponaj eventoj aŭ ceremonioj de la franca historio:

1239 - la reĝo Saint Louis (Ludoviko la Naŭa) alportis el Bizanco la Sanktan Dornkronon.

1302 - Philippe-le-Bel (Filipo la Kvara) kunvenigis la ŝtatan Delegitaron.

1431 - Kronado kiel franca reĝo de Henri VI, naŭjara princo, el Anglujo, sed ses jarojn poste la vera reĝo Charles le Victorieux, (Karlo la Sepa), fine venkinte, reĝis super »sia bona urbo Parizo« kaj tie ĉi kantigis Te Deum.

1455 - Revizio de la proceso de Johana d‘ Arc.

Multaj luksaj edziĝoj:

1558 - Francois II (Francisko la Dua) al Marie Stuart.

1572 - Henri de Navarre (estonta Henriko la Kvara) al Marguerite de Valois.


1782 - La juna franca reĝino, Marie-Antoinette, feliĉa, vizitis la preĝejon post la naskiĝo de la kronprinco.

Ve! Dek jarojn poste, la popolamaso, per ŝnuro ĉe la kolo, faligis la statuojn (28 reĝoj el Jehudo kaj Izraelo, laŭ la Biblio), kiujn ili opiniis francaj, kaj ankaŭ disrabis la trezoron.

La francaj reĝoj kutime estis kronitaj en la katedralo de Reims, memore al la unua reĝo Clovis (Klodvigo) – nur du kronadoj okazis en Notre-Dame: tiu de la angla reĝeto, kaj tiu de Napoleono la Unua (1804).

La unuan ŝtonon de nia orientita katedralo starigis la Papo, ekzilita, Aleksandro la Tria, en la jaro 1163, en la ĉeesto de la franca reĝo Louis le Jeune (Ludoviko la Sepa). La konstruon iniciatis Maurice de Sully (filo de modestaj simplaj arbohakistoj el Sully-sur-Loire). Li estis naturdotita. La ekleziaj aŭtoritatoj lin rimarkis kaj lernigis, baldaŭ igis lin kanoniko en Parizo, post unu jaro li iĝis episkopo kaj li restis tie dum 36 jaroj. Ŝajnis al la nova episkopo necese pro la dikiĝo de la urbo Parizo anstataŭigi la etan romanikan bazilikon Saint Etienne, kiu mem anstataŭis pli malnovan dediĉitan al la Dipatrino. Tuj aliĝis al la episkopaj vivrimedoj la donacoj de la reĝo, de la nobeloj, de la burĝoj. La simpla popolo kun ega fervoro donacis sian laboron. Nu! Kia entuziasmo!

La ĉefaltaro estis konsekrita en la jaro 1182, la ĥorejo finita en la jaro 1177, la navo en la jaro 1208, la fasado kaj la turoj en 1240. La kapeloj estis aldonitaj ekde la jaro 1240 ĝis la jaro 1325. La norda pordego (klostro) datiĝas ekde la jaro 1250, la suda (Sejno) ekde la jaro 1258. La arkitektoj Lassus kaj Viollet-le-Duc restaŭris la monumenton (19-a jc.). La episkopo de Parizo, Monsinjoro Darbois, konsekris la preĝejon en la jaro 1864, honorigitan ekde 1805 per bazilika titolo.






***La 15-an de aprilo 2018 post la 18-a horo eksplodis incendio, kiu estis estingita sekvan tagon matene. La incendio detruis preskaŭ tutan tegmenton inkluzive de tipa sanktusturo, parton de la vitraloj kaj parton de la portaj volboj en la bazilika navo. Tiu ĉi katastrofo kortuŝis milionojn da koroj en la tuta mondo.*** ■